

KUNVOKO

al la Jarkunsido de Kulturdomo de Esperanto

la 4an de junio 2016 en kastelo Greziljono je la 14a

La Jarkunsido okazos sabaton, la 4an de junio 2016. La registrado komenciĝos je la 13a 30.

La societanoj estas invitataj alveni en la kastelon ekde vendredo vespere por spekti koncerton de la fama koruso *La Viva*. Bonvolu aliĝi en la retejo por ke ni povu plani manĝojn kaj tranokton. Dimanĉon okazos komitatkunsido. Vi povos alveni kelkajn tagojn pli frue aŭ resti pli longe por helpi, ripari aŭ ĝardenumi.

La societanoj, kiuj ne povos ĉeesti, bonvolu sendi sian rajtigilon plenigitan per la nomo de societano ĉeestonta dum la Jarkunsido, kontaktinte tiun ĉi, por obei la statutan regulon limigantan la nombron de rajtigiloj je 5 por ĉiu persono. Vi povas konsulti la liston de la societanoj anoncintaj sian ĉeeston en la retejo, rubriko "Jarkunveno": gresillon.org/kunveno ; NB: okaze de rajtigilo sen nomo, tiu ĉi ne uzeblis por voĉdonoj sed estos enkalkulata por la kvorumo, nome 1/6 de ĉiuj societanoj - t.e. 49 – necesa, por ke la Jarkunsido povu valide labori.

Tagordo

- 1) elekto de la prezidanto kaj sekretario de la kunsido,
- 2) nombrado de la ĉeestantoj kaj de la rajtigiloj,
- 3) evoluo de la nombro de societanoj, kontrolo de la kvorumo,
- 4) agadraporto 2015, diskuto kaj voĉdono (dum la kunsido),
- 5) financa raporto 2015, diskuto kaj voĉdono (dum la kunsido),
- 6) aprobo de la kontoj por la jaro 2015, reimputo de la profito 2014 kaj imputo de la profito 2015,
- 7) buĝeto 2016,
- 8) kvitigo al la Administra Komitato,
- 9) rezulto de la elekto de Komitatoj,
- 10) konstrulaboroj: aktuala situacio kaj prioritatoj,
- 11) aliaj demandoj.

Evoluo de la nombro de societanoj

La 31an de decembro 2015, kalkulinte forpasojn, donacojn de societaj partoj, perdon de societanece se oni ne donis vivsignon dum tri jaroj, restis 290 societanoj kun 984 societaj partoj A (je 16 €).

Cetere, dum sia unua funkcijaro, 93 societaj partoj B (je 200 €) estis akiritaj, kio altigas la societan kapitalon je 118 %, tamen sen altigi la nombron de voĉdonrajtoj.

Agadraporto

La jaron 2015 karakterizas ĉeesto de du deĵorantoj en la kastelo: Isabelle Nicolas konstante deĵoris inter aprilo kaj komenco de novembro, kun la celo disvolvi nian agadon. Geneviève Bouilloud, elektro-hipersentema, ĉeestis inter novembro 2015 kaj martofino 2016, profitante malfortan poluon per elektro-magnetaj ondoj.

Krom ĉeestado de Isabelle Nicolas kaj Geneviève Bouilloud, la kastelo estis okupita dum 47% de la tempo: 59 tagoj da staĝoj, 62 tagoj da luadoj, 45 tagoj da laboroj, 2 tagoj da ne-esperantistaj aranĝoj organizitaj de Isabelle Nicolas kaj 2 tagoj por Jarkunsido kaj Komitatkunveno (sen nombri la 7 aliajn telefonajn komitatkunvenojn). La Esperanto-staĝoj videble fortiĝis : 59 tagoj en 2015 anstataŭ 38 et 2014. Ĉiuj semajnfinoj inter la 13a de marto kaj la 8a de novembro estis okupitaj, escepte de la periodo inter la 1a kaj 15a de septembro, dum kiu okazis la laboroj de ERdF (enterigo de elektra kablo meztensia sub nia enirvojo).

Staĝoj

La komuna renkontiĝo de Interkant' kaj La Kompanoj, prepare al la Universala Kongreso de Universala Esperanto-Asocio (UEA) en Lillo (julio 2015), kunigis 48 ĉeestantojn de la 3a ĝis 8a de aprilo, el kiuj 38 pagantoj. Jannick Huet estis staĝestro kaj Valérie Delaire kuiradis.

PRINTEMPaS kunigis 41 ĉeestantojn de la 17a ĝis la 26a de aprilo, el kiuj 33 pagantoj (40 en 2014, 38 en 2013), kaj 12 trapasis ekzamenon (26 en 2014, 14 en 2013). La ekzamenantoj estis Zsófia Kóródy kaj François Lo Jacomo. La kursojn gvidis Zsófia Kóródy, Christophe Chazarein kaj Marion Quenut. Jannick Huet staĝestris kaj Valérie Delaire kuiradis.

La someraj staĝoj okazis dum kvar semajnoj (kontraŭ du en 2014). Unua semajno pri reciprokaj interŝanĝoj de scioj, de la 6a ĝis la 13a de julio, kiun staĝestrin Elisabeth Barbay. Turisma semajno – de la 20a ĝis la 25a de julio – proponita al la 2700 partoprenantoj de la Universala Kongreso de UEA en Lillo, kun ĉiuj ĉambroj okupitaj. Jannick Huet staĝestrin kaj Catherine Kremer ĉiĉeronis. Staĝo « Lingvoj kaj Kulturoj de l' Mondo » de la 1a ĝis la 8a de aŭgusto 2015, kiun Jean-Luc Kristos kaj Isabelle Nicolas kune staĝestrin. Tiu ĉi staĝo komenciĝis per lingva festivalo en la Kulturcentro René d'Anjou kun kelkaj vizitantoj el Baugé. Fine, festa semajno por infanoj kaj familioj, de la 8a ĝis la 16a de aŭgusto, kun staĝestro Bert Schumann. Tiuj 4 staĝoj kunigis 115 ĉeestantojn (79 en 2014) el kiuj 107 pagantojn (59 en 2014). La kursojn gvidis i.a. Jean-Luc Kristos kaj Elisabeth Barbay. Kuiradis Frédéric Lahier.

Dum la staĝon AŬTUNE, de la 24a de oktobro ĝis la 1a de novembro, estris Bert Schumann kaj instruis Zsófia Pataki kaj Stefan MacGill. Tiu lasta integris ĝin en AMO, ciklo de Aktivula MaturigO de UEA (kies vicprezidanto li estas). Paralele, la koruson Interkant' ĥorestis Zdravka Bojĉeva. Manĝaĵojn preparis Frédéric Lahier. La staĝo kunigis 38 personojn, el kiuj 32 pagantoj.

Entute, la 59 tagojn de staĝoj vizitis 242 personoj (204 en 2014) kun 4.090 manĝoj (3.340 en 2014) kaj 1.455 tranoktoj (1.181 en 2014).

Agadoj de Isabelle Nicolas

La asocio « La Kampo de la Griloj », prezidata de Isabelle Nicolas, estis fondita: ĝia komitato konsistigita. Tiu asocio ebligas disvolvi novajn agadojn, por kiuj nia statuto de kooperativa societo estas malhelpo.

Isabelle organizis plurajn aranĝojn: festan vesperon – balo, variaj muzikoj, kunlaboraj ludoj, malfermaj scenoj – sabaton, la 4an de julio. Tri atelierojn de cirkarto, ĵonglospektaklo, sabaton, la 11an de julio. FESTIVALISE, festivalon de ĝemelado kun la germana urbo Kelsterbach kaj la loka loĝantaro, sabaton kaj dimanĉon, la 1an kaj la 2an de aŭgusto. Inaŭguron kaj ekspozicion pri la temo Anĝelo Branduardi per fotoj kaj pentraĵoj, de la 13a ĝis la 31a de aŭgusto.

Ludonoj

La trian jaron, la kastelo estis malfermita por ludonoj al eksteraj personoj. La 22 ludonoj (14 en 2015) havigis al ni 28.234 € malnete, t.e 21.200 € nete. Ni ne ludonis por infanferiado dum la lernejaj ferioj, sed 2 tutsemajnaj luantoj kompletigis la semajnojn neokupitajn per niaj kvar staĝoj. Ok luprenantoj mendis kuiradon de Frédéric Lahier aŭ lia anstataŭanto, Frédéric Sourice. La ĉambrojn antaŭ la luoj purigis Amélie Sourice.

Konstrulaboroj

Dum 45 tagoj, ni daŭrigis la komencitajn konstrulaborojn. La ĉambroj 21 ĝis 26 sur la dua etaĝo estis renovigitaj kaj de nun ĉiuj uzataj. La ĉambroj 22 et 23 havas novajn fenestrojn. Ni finis anstataŭigi la pordojn per kontraŭfajraj pordoj kun pordofermiloj, escepte de ĉambro 14. En salono Zamenhof, ĵus antaŭ la ekspozicio pri Anĝelo Branduardi, du muroj estis renovigitaj kaj lampoj aldonitaj.

La volontuloj ŝatas okupiĝi pri la eksteraj spacoj, aparte pri floroj kaj masivoj de floroj. Ĉiuj poploj estis replantitaj, tajlitaj kaj sekurigitaj kontraŭ la sovaĝaj bestoj. Post longa diskutado, nova traktora gazontondilo estis aĉetita. La longdaŭra lukontrakto de la Verda Vojo, kiu ekvalidis la 1an de januaro 2016, por daŭro de dudek jaroj, estis subskribita la 31an de decembro 2015. La laboroj komenciĝis en januaro 2016 kaj atingis nian terenon en marto 2016.

La laboroj de la kontrakto kun ERdF (franca elektrodistribuant) estas finitaj: la tuboj kaj kabloj enterigitaj. Niaj kabloj telefona kaj elektra je 360 V ne plu videblas kaj pli sekuras. La malnova kontraŭfajra alarmilo paneis, ni anstataŭigis ĝin kaj ankaŭ la fumdetektilojn per jonkestaj.

La « Teknika Vortaro de Greziljono », kompilita de Frédéric Lauriol kaj lia teamo, vaste modifita post ĝia antaŭa versio, estas presata. Ĝi estos vendata dum la staĝoj; ĝin vi jam povas mendi per la libroservo de la Kulturdomo.

Ni danku al Anne-Marie Bénéix, Barbara Gulminelli, Bert Schumann, Christian Lavarenne, Corinne Sœur, Dominique Baron, Frédéric Lauriol, Geneviève Bouilloud, Gilles Turgis et Julia, Isabelle Nicolas, Isabelle Nicoloso, Jean-Jacques Moreau et Victor, Marie-Françoise Guillaume, Nathalie Dubrulle, Pierre Tell Bouvier, René Jelenc, Ugo de Maubeuge, Vincent Prugnard, Vito Markov, Walter Jakowski kaj Yves Couturier, kiuj partoprenis en tiuj diversaj semajnfinoj kaj volontulaj laboroj.

Financa raporto

El financa vidpunkto, la jaro 2015 estis bona jaro: la vendosumo altiĝis je 25 %, la neta rezulto pli ol triobliĝis por atingi 13.098 €, t.e. 17 % de la neta vendosumo. Ni efektive pagas ĉi-jare 1.509 € de imposto pri firmaa profito. Aliflanke, dank' al 93 societaj partoj B venditaj en 2015, po 200 €, la societa kapitalo pli ol duobliĝis (34.344 €) kaj la disponebla aktivo altiĝis je pli ol 50 % (96.299 €).

Ni certe profitis el la Universala Kongreso en Lillo: la antaŭkongreso, kiun ni organizis (vizito de la kasteloj ĉe Luaro du la 20a ĝis la 25a de julio), enspezigis pli ol 20 % de nia vendosumo, por rezulto je pli ol 2.000 € (sen AVI) post dedukto de ĉiuj elspezoj. Sed la daŭro de ĉiuj Esperantostaĝoj altiĝis je 50 %: staĝoj kaj ludonoj gajnis ambaŭ 25 % pli ol en 2014.

Pro tio nepre altiĝis kelkaj kostoj: salajroj kaj socialaj kostoj (kuirado, purigado), manĝaĵoj (ĉefaj materioj), akvo, elektro, gaso (provizado), sed ankaŭ de kelkaj rimedoj, precipe vendado de varoj. Eĉ la kotizoj kaj anoncoj (aliaj eksteraj servoj) altiĝis: Greziljono pagis reklameton sur la unua mapo de Baugé-en-Anjou. Kontraŭe, verŝajne pro la fakto ke ni rezignis pri la Greziljona Silvestra Festeno, la kosto de mazuto malaltiĝis.

La tri linioj de kostoj: « Laŭokazaj laboristoj kaj honorarioj, Provizoraj dungitoj / makleraĵoj, kaj Vojaĝelspezoj, komisiono, akceptoj » transiris globale de ĉirkaŭ 13.000 € al 10.500 €, sed dispartiĝis tre malsame. En 2014, ni pagis advokaton, kaj kelkaj laboroj de Frédéric Lauriol estis pagitaj tra dungagentejo: ĉi-jare ni ŝparis ĉirkaŭ 6.000 € en tiuj du punktoj. Bert Schumann deĵoris volontule por certaj ludonoj. La honorarioj de la librotenisto malpliĝis (700 €), ĉar Frédéric Dambreville mem tajpas la librotenajn enskribojn per la retprogramo Flynnet. Sed la aktiveco de la jaro estis pli ampleksa, ni venigis pli da animantoj kaj volontuloj, pro tio okazas altiĝo je pli ol 2.000 € de elspezorepagoj, kaj ni pagis pli ol 2.500 € al manĝopreparisto.

Oni ankaŭ notu malpliĝon de aĉeto de libroj, stabiĝon de la stoko de libroj kaj malpliĝon de la stoko de memoraĵoj. La donacojn ofte anstataŭis aĉetoj de societaj partoj B, kiuj altigis la kapitalon sed ne influas la spezokonton. La kostoj de prizorgado kaj riparoj altiĝis: ni elspezis pli por la tegmentisto, la plumbisto, la lignisto... Sed ni ricevis repagon de asekuro MAIF por katastrofo de 2014 (akvodamaĝo).

Ni esperu ke ni sukcesos teni tiun ascendan dinamikon, kaj ni dankas al ĉiuj kiuj penis volontule por disvolvi la agadon de la kastelo. Tiu plibeliĝo, pri kiu ni ĝojas, estas tamen fragila, se konsideri ĉiujn laborojn, kiuj restas farendaj: ni ricevis antaŭ nelonge antaŭfakturon por la riparo de la tegmentoj je 390.000 € entute.

Studinte le bilancon kaj spezokonton de 2015, mi konstatis kelkajn eraretojn en la financaj tabeloj de la pasinta jaro, kaj mi aŭdacis korekti ilin en la ĉi-jaraj tabeloj, kvankam la antaŭe publikigitaj estis aprobitaj de la pasintjara jarkunsido. Temas en la spezokonto pri « Luprenado kaj luaj kostoj » (120 € anstataŭ 451 €, kiu estis la kosto de la antaŭa jaro), pri la neta vendosumo (kiu ekskludas 3 € de « aliaj rimedoj »), kaj en la bilanco, inter la nmoveblaĵoj, pri la teknikaj instalaĵoj (nulaj kaj ne negativaj, la pasintjaraj – 5.341 € aldoniĝu al la supra linio). La kutimaj rubrikoj de la buĝeto ne estas optimume elektitaj, unuflanke ĉar ili ne respondas al nia librotenada plano, kaj aliflanke ĉar kelkaj estas tre malaltaj kompare kun aliaj (de 100 € ĝis 10.000 €); publikigante la realigon de la buĝeto 2015 tia, kia ĝi estis aprobita, mi proponos de nun novan strukturon de buĝeto, pli ekvilibranta kaj konformanta al nia librotenada plano.

Por fini, okazis eraro ankaŭ pri la uzmaniero de la profito 2014, kiun ni ne povas korekti sen formala voĉdono de la nuna jarkunsido. Pro malatento, malobee al nia statuto kaj eĉ la leĝo, ni enskribis la tuton de la profito aldone al novtransportorezulto, kvankam ni devis uzi 15 % por laŭleĝa rezervo kaj la ceteron por « disvolviga fonduso cele al la pligrandigo de la Societo ». Antaŭ la aprobo de la kontoj 2015, ni do petos vin aprobi tiun ĉi obeendan uzmanieron de la profito 2014, kaj sekve ni decidus la uzmanieron de la profito 2015 konforme al nia statuto. Nur poste ni povos pagi al la posedantoj de la societaj partoj B la interezojn 2015, kiujn ni ŝuldas al ili.

La financaj tabeloj (bilanco, spezokonto, buĝeto) ne estas senditaj kun tiu ĉi kunvokilo: ili estas afiŝitaj en nia retejo, estos disdonitaj dum la jarkunsido kaj estos senditaj al ĉiu societano kiu ilin petos. Same pri aldona teksto prezentanta nunajn projektojn, kiu povos esti diskutata dum la jarkunsido.

Somera programo 2016



Resumo de la someraj semajnoj 2016 kun Esperanto-kursoj

	La Luaro laŭ fluo de la vortoj , turisma semajno	10-taga E-kurso kaj Interŝanĝoj de scioj	SOMERAS, Eo-studad-semajno	Festa Semajno por infanoj kaj familioj , preparo por lernejo
<i>por kiu ?</i>	intereso pri turismado, kasteloj, francaj verkistoj kaj historio	progresintoj en Esperanto, asocioj pri scio-interŝanĝo	lernantoj de Esperanto el ĉiuj niveloj, junuloj	infanoj, adoleskantoj, familioj kun beboj kaj geavoj
<i>datoj</i>	2016-jun-12/17 (S1)	2016-jul-04/11/15 (S2)	2016-aŭg-06/13/15 (S3)	2016-aŭg-21/28 (S4)
<i>kursoj kaj aktivajoj</i>	<ul style="list-style-type: none">▶ tuttagaj ekskursoj laŭ tiu programo▶ reĝaj kasteloj ĉe rivero Luaro kaj rezidejoj de verkistoj▶ profesia esperantista ĉiĉerono	<ul style="list-style-type: none">▶ kurso pri la esprimo de la tempo en Esperanto▶ Esperanto-kurso por komencantoj▶ Interŝanĝoj de scioj kaj scipovoj	<ul style="list-style-type: none">▶ studado de Esperanto je 5 niveloj▶ koncertoj▶ aktivajoj artaj, kulturaj, malstreĉigaj▶ ekskursoj kaj promenoj	<ul style="list-style-type: none">▶ diversaj manlaboroj▶ banado en lagoj▶ sportaj aktivajoj▶ Esperanto-kursoj
<i>animantoj instruantoj staĝestro</i>	<ul style="list-style-type: none">▶ Catherine Kremer▶ Jannick Huet 	<ul style="list-style-type: none">▶ Elisabeth Barbay▶ Christian Rivière 	<ul style="list-style-type: none">▶ Mikaelo Bronŝtejn▶ Tim Morley▶ Przemek Wierzbowski▶ Marion Quenut▶ Christophe Chazarein▶ Jannick Huet 	<ul style="list-style-type: none">▶ Jean-Luc Kristos▶ Ansofi Markov▶ Elisabeth Barbay▶ Bert Schumann 

Vi povas informiĝi pri niaj kursoj kaj staĝoj kaj aliĝi laŭ diversaj manieroj:

- en nia retejo sub: gresillon.org/agendo kaj: gresillon.org/aligho
- per retletero al: kastelo@gresillon.org
- per telefono al: +33-2 41 89 10 34 (Isabelle), +33-6 51 24 24 23 (Bert), +33-2 99 83 69 86 (Jannick)
- per letero al la sekretario: Schumann/MCE, 9 rue du Couradin, 35510 Cesson-Sévigné, FRANCE
- venante al: Grésillon, route du Lude, Saint Martin d'Arcé, 49150 Baugé-en-Anjou

Via Kulturdomo bezonas vian helpon!
Bonvolu aliĝi kaj aliĝi viajn amikojn.

SINPREZENTOJ DE LA KANDIDATOJ

Bert Schumann

55-jara informadikisto el Rennes, germano kaj franco, esperantisto de 35 jaroj, E-lingva familio de 22 jaroj, KER-ekzameno C1, membro de UEA, UFE, SAT-Amikaro kaj EDE.

En Greziljono mi partoprenas laborsemajnfinojn de ĉ. 15 jaroj, societaniĝis en 2003, komitata konsilisto ekde 2006, tiam mi ekaktivis pri la interretejo (gresillon.org), varba dissendado kaj societan-listo, programorganizado, staĝestrado. Kiel komitatano elektita en 2012, estrarano kaj sekretario, mi koncentriĝas pri sekretariado lige kun kasistaj taskoj.

Mi plu agas por la malfermo al neesperantista publiko, atentante ke Greziljono restu organizo sendependa kaj loko disponebla prioritare por Esperanto-aranĝoj. Greziljono funkcii kaj estu prizorgata laŭeble per volontuloj, sed ne hezitu dungi salajrulojn aŭ pagi firmaojn por specifaj taskoj.

En 2012 mi engaĝiĝis pri aranĝoj por infanoj, junuloj kaj familioj. La "Infana semajno" okazas ĉiujare en aŭgusto, porinfana programo okazas ankaŭ dum "Aŭtune".

Xavier Godivier

46-jaraĝa, mi loĝas en Bretonio. Mi delonge aktivas en Greziljono kaj jam estis komitatano dum 10 jaroj de 2004 ĝis 2014. De tiam, mi daŭre regule venas kun mia filino baldaŭ kvarjaraĝa kaj jam plia kastelanino de Greziljono. Post dujara paŭzo el la komitato, mi pretas reveni por helpi al la administrado kaj prosperigo de la kulturdomo.

Apogante la partneran asocion "La Kampo de la Griloj", mi deziras labori por pli klare difini la respektivajn rolojn de la Kulturdomo kaj de la asocio, por ke tiu partnereco estu plej fruktodona por tiu magia loko Greziljono.

Bicikloŝatanto, mi ŝatus ankaŭ esplori, kion ni povas esperi el la kreo de la nova bicikla vojo laŭlonge de la Greziljona bieno.

Nathalie Kesler

Pri mi persone: Mi estas instruistino pri la franca lingvo, historio kaj geografio kaj nuntempe loĝas inter Bretonio kaj Parizo, kun nia nuna prezidanto, kun kiu mi povas ankoraŭ alporti novajn fortojn al la kastelo.

Pri Greziljono: Mi ne promesas esti 100% de mia tempo en Greziljono pro mia laboro, sed mi scias, ke mi havos sufiĉe da tempo por provi alporti miajn kapablojn, kaj provos helpi vin vivi tiun lokon en daŭra maniero, studante novajn projekteblecojn. Mi jam kontribuis per volontula akcepto de staĝanoj en la kastelo kun Jannick, kiam ŝi estis staĝestro kaj fidis min por kelkaj taskoj. Mi registris la kastelon en la reta luisistemo Airbnb kun ŝia helpo kaj helpis Isabelle en la unuaj paŝoj de la asocio La Kampo de la Griloj.

Pri Esperanto: Mi sekvis mian unuan intensan Esperanto-kurson en la kastelo kaj sukcesis la skriban KER-ekzamenon B2 post nur unu jaro. Mi estis unu el la reprezentantoj de UEA en Unesko dum ĝia 38a Ĝenerala Konferenco, kaj aktivis tie por promocii Esperanton. Krome, mi sukcesis mendi budon por Esperantistoj en Monda Vilaĝo de Alternativoj, okaze de COP21.

René Jelenc

66 jaraĝa, pensiulo.

Mi eklernis Esperanton en Greziljono dum la somero 1955 kaj poste mi partoprenis multnombrajn staĝojn ĝis la 70aj jaroj. Mi ĉeestis multajn kongresojn kaj estis prezidanto de la Loka Kongresa Komitato de Internacia Junulara Kongreso de TEJO en Poitiers dum la jaro 1977.

Post intensa profesia vivo kiel estro de firmao, mi retiriĝis en 2014.

De tiam, mi partoprenis plurajn laborsemajnojn en Greziljono por la prizorgado kaj la plibonigo de la kastelo kaj de ĝia parko.

Mi nun deziras kunlabori sur la kampo de mastrumado de la societo kaj de konservaj laboroj, por ke pluvivu la Kulturdomo de Esperanto.

Alfred Schubert

Mi estas ĵurnalisto, kiu laboras en Germanio. Mia ĉefa profesia intereso estas "alternativaj" energioj, fervojo kaj elektraj aŭtomobiloj. Private mi ŝatas vojaĝi, pro tio mi jam multfoje estis en Francio, trifoje en Greziljono. Mi parolas la germanan, anglan, francan kaj internacian lingvojn. Esperanton mi lernis antaŭ 36 jaroj kaj ekde 1981 aktivas en la Esperanto-movado - interalie en la Munkena Esperanto-Klubo, Bavara Esperanto-Ligo, Germana Esperanto-Asocio, EDE-DE, Unu Mondo kaj TEJĴA, kies prezidanto mi nun estas.

En Greziljono mi volas ĉefe okupiĝi pri la renovigo de la konstruaĵoj kaj pri utiligo de alternativaj energioj - suno, vento kaj akvo por produkti elektran energion, ligno por hejti kaj varmigi akvon. Krome mi ŝatus internaciigi la vivon en la kastelo.